

# Sennaciulo

Oficiala organo de sennacieca asocio tutmonda

Februaro 2002

ISSN 1163.0442

*\*Pri la enhavo de artikoloj respondecas la aŭtoroj mem\**

<http://www.sat-esperanto.org/> \*\*\* retadreso: [satesper@noos.fr](mailto:satesper@noos.fr)

73-a jaro, n-ro 2 (1160)

MENSUEL/MONATA



Adiaŭ  
kamarado  
IVO

Grava  
komuniko,  
paĝo 18

*Fotis k-do  
Mikaelo SCHERM, dum la  
kongreso en Karlovy Vary*

SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI

## El la redaktejo...



*Karaj gekamaradoj, tiu ĉi numero de Sennaciulo estas redaktita sub peza premo ke bona kamarado kaj amiko por ĉiam forlasis nin. En la*

*januara S-ulo (kiu cetere malfruis) ni povis nur informi vin pri tiu bato kiu trafis nian Asocion. Duono de tiu ĉi numero estas dediĉita al k-do Peyraut. Pro tio mankas en ĝi kelkaj kutimaj rubrikoj, kiujn vi retrovos en marto. Mi atentigas ĉiujn bone legi la apudan komunikon kaj agi konsekvence. Krom tio pensu pri kotizoj. Ĉiujare estas pluraj malnovaj membroj kiuj forgesas pagi la kotizon kaj poste ni devas rememorigi per aparta letero, kio estas elspeziga por SAT kaj malagrabra por oficistoj.*

*Nun vi posedas kongresaliĝilon. Aliĝu tuj, ĉar tio helpas al la OKK kaj krome estas malpli kosta. Ni estu nombraj en Alikanto, kie ni traktos gravajn punktojn koncerne la estontecon de SAT.*

*Salutas vin ĉiujn, via*

*Redaktoro*

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiiilo: +33.1.47.97.71.90.

Retadreso: satesper@noos.fr.

TTT-paĝoj:

<http://www.sat-esperanto.org>

Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registriilo.

Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.

Redaktas: Redakta Komitato - P. Lévy, G. Rollin kaj K. Barkoviĉ.

Ĉefredaktoro : Kreŝimir Barkoviĉ

Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.

\*

Imprimé par : S.I.B., B.P. 343, FR-62205 Boulogne-sur-Mer Cedex, Francio.

Aperas monate - Mensuel.

Le directeur de la Publication: Jacques BANNIER

Abonnement annuel/jara abono France 52€

Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.

Dépot légal à la date de parution.

Commission Paritaire n° AS-74399

**Limdato por ricevo de kontribuajoj estas ĉiam la 10-a en la monato.**

## KOMUNIKO DE LA PLENUM-KOMITATO

La Plenum-Komitato de SAT sciigas la membraron, konforme al la Paragrafo 10 de la Statuto, ke ĝia mandato finiĝos la 28-an de februaro 2003.

Sekve de la lasta ŝanĝo en la Statuto, ni invitas ĉiujn individuojn kaj grupojn elekti siajn kandidatojn aŭ kandidati persone por la nova P.K. Ĉiu kandidato bone legu la paragrafon 13. de la Statuto. Por kandidatiĝi bonvolu procedi jene.

1. a) Individuaj (personaj) kandidatoj bonvolu sendi skriban kandidatiĝon, kun mallonga biografieto (sinprezento) kaj malgranda foto, al la SAT-sidejo, antaŭ la 15-a de majo 2002.

b) SAT-kolektivo aŭ grupo povas sendi liston de siaj kandidatoj - kun samaj indikoj kiel supre.

2. Ĉiuj kandidatoj, estos prezentitaj al la membraro unue en junia Sennaciulo, poste al la kongreso en Alicante, kaj fine decidos la ĝenerala referendumo en novembro 2002.

3. Dum la referendumo oni voĉdonos por ĉiu kandidato individue kaj la 8 kandidatoj kun plej granda nombro da jesaj voĉoj estos novaj Plenum-komitatoj.

Dum la sama referendumo okazos elekto de la Ĝenerala Konsilantaro (por horzonoj). La sekretario de la Konflikto-Komisiono sendos cirkuleron al la Ĝ.K.-anoj por peti konfirmon pri ilia kandidateco. Novaj kandidatoj bonvolu sendi sian kandidatecon al la sekretario de la Konflikto-Komisiono, k-do Jakvo Schram.

En Parizo, la 1-an de februaro 2002

La Plenum-Komitato de SAT


## ĈU VI PAGIS VIAN KOTIZON 2002 ?

### ATENTIGO AL NIAJ KUNLABORANTOJ

Ni petas ĉiujn niajn kunlaborantojn sendi al ni siajn tekstojn ĉu per la reto en la formato de teksto aŭ sur la disketoj en la formatoj de Word, Apple (Claris)Works, aŭ prefere en la formato RTF. Bonvolu nepre tajpi viajn tekstojn per la sistemo x (cx = ĉ, sx=ŝ ktp) ĉar tio ebligas al ni facile transformi la tekston en normalan Esperanton. Se vi sendas tekstojn surpapere, vi tajpu ilin normale. Dankon.

La Redakcio

# Ivo PEYRAUT - 1934-2002



**Yves (IVO) PEYRAUT** naskiĝis la 14-an de septembro 1934 en Rochefort -sur-Mer, Francio. Jam kiel 16-jarulo li ekinteresiĝas pri Esperanto kaj lernas ĝin. Samtempe li fariĝas membro de movado de junulargastejoj, kiun frekventis diversaj tendencoj de la laborista movado. Inter ili estis reprezentantoj de la Esperantista laborista E-movado, membroj de SAT-Amikaro kaj SAT. Li tuj sentis sin bone kun ili kaj decidis aliĝi al SAT. Tion li faris en januaro 1953. Per sia E-instruisto, li estis honeste informita pri ĉiuj aspektoj kaj branĉoj de la Esperanto-movado. Tiel li povis tute libere elekti. Lia unua SAT-kongreso estis tiu de SAT en Duseldorfo (1952) kaj la unua UK estis tiu de Zagrebo en 1953. Finfine li konstatis ke la laborista E-Movado estas al li plej proksima. Dum sia juneco Ivo fondis plurajn laboristajn E-grupojn kaj aktivis en ili, kvankam tre okupita per siaj politikaj kaj profesiaj agadoj. Li fariĝas prezidanto de la Plenum-Komitato de SAT en la jaro 1985 kaj estis reelektata ĝis la fino de sia vivo. Malgraŭ siaj sanproblemoj, k-do Peyraut tre aktivas kadre de la P.K. kaj estas unu el la ĉefaj motoroj. Li partoprenis (laŭeble) ĉiujn sekvajn SAT-kongresojn ĝis tiu de Nagykanizsa. Lia lasta U.K. estis tiu de Zagrebo, lastjare. Subita, neatendita sanproblemo forportis lin la 5-an de januaro 2002 en la aĝo de 68-jaroj. Li restos por ni inspiro kaj ekzemplo por la daŭra kaj senhalta lukto favore al pli bona kaj pli justa vivo.

K.B.

*Nia asocio ricevis multajn atestojn de simpatio okaze de la forpaso de nia amiko Ivo. Ili venis de individuoj kaj organizoj. Ni elkore dankas al ĉiuj, kaj ĉar ni ne povas danki al ĉiuj persone kaj aparte, ni faras tion ĉi tie publike, per aperigo de preskaŭ ĉiuj el ili.*

*La P.K. de SAT*

\*\*\*

## UEA - ROTERDAMO (NL)

Nome de UEA mi prezentas al SAT la plej sincerajn kondolencojn.

Pluraj el ni havis la eblecon sperti la homajn kvalitojn de Yves dum la kunlaborado por Esperanto en pluraj kampoj.

La forpaso de Yves estas granda perdo ne nur por SAT sed por la tuta Esperanto-movado.

Renato Corsetti  
prezidanto de UEA

Kun granda malĝojo mi eksciis pri la morto de nia SAT-prezidanto, k-do Y.Peyraut. Mi esprimas kondolencojn al la francaj esperantistoj. SAT perdis sian gravan batalanton kaj estron.

Kun granda bedaŭro  
Natalia Aroloviĉ (Rusio)

\*\*\*

Mi ĵus legis la novaĵon pri la forpaso de Yves PEYRAUT kaj mi deziras esprimi al SAT miajn kondolencojn pro la perdo de tiom aktiva kamarado, kiu donis multon por la kresko de nia organizo. Pezkore,

Atilio ORELLANA ROJAS (Nederlando)

\*\*\*

Estimataj gesamideanoj!

Akceptu miajn sincerajn kondolencojn okaze de la morto de prezidanto de SAT s-ro Yves Peyraut. Plenkore mi deziras al SAT, malgraŭ la perdo, persistan antaŭiron.

Tatjana Auderskaja kaj junulara E-klubo «Verdaĵo», Ukrainio

\*\*\*

En la nomo de la SAT-membroj el la Belga regiono, mi sendas niajn kondolecojn al la familio de Ivo Peyraut, al Plenum-komitato kaj al SAT.

Jakvo Schram, peranto de SAT en Belgio